

Johann Wolfgang von Goethe,

## Kanto de la spiritoj super la akvoj

*tradukita de Karl Jost*

La homa animo  
similas al akvo,  
de l' ĉielo ĝi venas,  
al ĉielo ĝi iras,  
kaj devas denove  
reveni al tero,  
daŭre ŝanĝante.

Torente de l' alta  
kruta rokvando  
pura la akvo  
ĉarme disŝprucas  
je nubondoj  
sur glatan rokon,  
kaj facilkviete  
fluas nubvuale,  
murmure  
en la profundon.

Se staras rifoj  
al falo kontraŭe,  
ĝi ŝaŭmas kolere,  
ŝtup-al-ŝtupe  
abismen.

...

Nun malrapide  
 ĝi trarampas la valon,  
 kaj en glata la lag'  
 respegulas sin.  
 ĉiuj la astroj.

Vent' estas al ondo  
 ĉarma kunulo;  
 vent' kirlas el fundo  
 ŝaŭmantajn ondegojn.

Animo de l' homo,  
 vi similas al akvo!  
 Sorto de l' homo,  
 al vent' similas ja vi.

*Traduko de la Germana poemo "Gesang der Geister über den Wassern" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de KARL JOST (\*1876 – †1952).*

*Arg-504-989 (2010-01-11 12:54:14)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la revuo "Heroldo de Esperanto", n-ro 9 (1144), 27-a jarkolekto, de l' 1-a de junio 1951. Vidu ankaŭ la retejon <http://www.literaturo.dk/spiritoj.htm>. S-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, Danio, [lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)) enmetis ĝin tien. Karl Jost estis tre aktiva Esperantisto loĝinta en la svisa urbo Zuriko. Li estis kunfondinto de la Zurika Esperanto-Societo kaj verkis multajn tradukojn, lerno-libron de Esperanto kaj aliajn Esperantaĵojn. Vidu ankaŭ la retejon [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)*